

# Julia Isbrücker

Pioniro de Esperanto

Frontlinia virino

Kolektita materialo



Wien - Vieno - 2020

Erste Auflage - Unua eldono  
Wien - Vieno 2020  
ISBN 978 3 903247 36 9  
esperanto@chello.at

Reviziis Irene Klag  
Nevendebla, privata eldono.

Provizora eldono.  
La definitiva eldono aperos post la klarigo de la aŭtoraj rajtoj.  
Pro la aŭtoraj rajtoj bonvole skribu al la redakcejo.



## Paĝo 1

50-Stela monero kun portreto de Julia Isbrücker desegnita 2020  
de mag. Helmut Andexlinger (monogramo A. H.),  
la ĉefdezajnisto de Münze Österreich (Monerfarejo Aŭstria).

Foto: Julia Isbrücker en Nürnberg, 1923, dum la 15a Universala Kongreso.

# Julia Isbrücker-Jaro 2020

Julia Isbrücker kunorganizis la 12an Universalan Kongreson de Esperanto, kiu okazis 1920 en Hago. Tiu kongreso pruvis, ke la Unua Monda Milito (1914-1918) ne povis neniigi la Internacian Lingvon. Julia Isbrücker kunfondis Internacian Esperanto-Instituton IEI kaj Universalan Ligon UL kaj kuneldonis la metalajn Stelo-monerojn, kies nominaloj estas 1, 5, 10 kaj 25 Steloj.

12a Universala Kongreso de Esperanto  
Hago, Nederlando  
8a de aŭgusto 1920 ĝis 14a de aŭgusto 1920  
Ĉeestis 408 personoj.



Kongresa ekskurso al Leiden

# Julia Isbrücker laŭ Vikipedio

Naskiĝo la 22-an de septembro 1887 en Rotterdam, Nederlando

Morto la 14-an de januaro 1971

Nacieco: nederlandano

Ŝtataneco: Reĝlando de Nederlando

Profesio: Esperantisto

Lingvoj: Esperanto, nederlanda lingvo

Ŝi verkis en Esperanto:

Raporto pri la Konstituanta Kunveno de la Popoloj (1951)

Vertaalde Esperanto-examenopgaven (1931)

Wereldvrede en Esperanto (En: Jubileumboek 1926-1931)

Esperanto-examenopgaven (1922)

Esperanto-examenopgaven voor diploma A en B met vertalingen (1934)

Vertaalde Esperanto-examenopgaven (1923)

Aliaj aktivajoj: Honora Membro de UEA; Membro de ICK

Familianoj: Edzo J. R. G. Isbrücker; filino Julia Guillaume-Isbrücker (1916-1999), kiu estis edzino de Jean Guillaume (interalie ĉefdelegito por Francio dum 30 jaroj; prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto 1974-1975). Julia Guillaume-Isbrücker ĉiam aktive partoprenis en E-aranĝoj kaj estis ĝis 1996 estraranino de IEI.

Julia Catharina ISBRÜCKER-DIRKSEN [júlia katarina isbrüker], naskiĝnome Julia Catharina DIRKSEN, postmilite Julia ISBRUCKER (naskiĝis la 22-an de septembro 1887 en Rotterdam, mortis la 14-an de januaro 1971) estis nederlanda esperantisto, Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio (UEA), membro de Internacia Centra Komitato kaj de la ekzamena komitato, prezidanto de la grupo en Hago kaj edzino de la vicprezidanto de UEA J. R. G. Isbrücker. Post la dua mondmilito la geedzoj skribis sian nomon sen tremoj (do Isbrucker, la prononco restis la sama).

## Esperanta agado



Julia Isbrücker (dekstre) ĉe la domo de Zamenhof en Varsovio, strato Dzika 9



Julia C. Isbrücker kaj Odo Bujwid dum la ekskurso al Pompeo dum la 27a UK en Romo, 1935

### **Antaŭ la dua mondmilito**

Isbrücker estis Esperantistino ekde 1909, baldaŭ poste ŝi verkis kun sia frato bonan lernolibron. Eksterordinare grava por la plua evoluo de la movado estis ŝia iniciato inviti la 12-an Universalan Kongreson en 1920 al Hago, en tempo, kiam post la unua mondmilito estis malfacile trovi taŭgan urbon por aranĝi la Universalan Kongreson.

Ŝi organizis la internacian Interreligian Konferencon en Hago 1928, fondis kun Andreo Cseh la Internacian Cseh-instituton en 1930 (poste Internacia Esperanto-Instituto). En ĝia kadro ŝi organizis sennombrajn kursojn, seminariojn, prelegvesperojn, vojaĝojn ktp.

En 1931 la urbestro de Arnhem (Nederlando) disponigis grandan domon kun parko, kie la instituto fondis la faman Esperanto-Domon. Danke al la organiza

talento kaj laborforto de s-ino Isbrucker ĝi fariĝis vigla Internacia Esperanto-Centro, kie okazis regule plej diversaj programoj, kursoj, kunvenoj, konferencoj ktp., plej ofte internaciaj.

Intertempe ŝi estis ankaŭ membro de ekzamena komitato, membro de Internacia Centra Komitato (ICK), prezidanto de la floranta haga Esperanto-klubo "Fine ĝi venkos", ŝi gvidis kursojn kaj faris prelegojn en diversaj neesperantistaj medioj. En 1939 ŝi fariĝis sekretariino de ĵus fondita Nederlanda Komitato por praktika aplikado de Esperanto, kies membroj estis i.a. la urbestro de Hago kaj direktoroj de banko, turistoficejo, P.T.T., Philipps kaj KLM.

## **Post la dua mondmilito**

Post la milito, kiam la domo en Arnhem estis detruita, ŝi dediĉis sin al nova afero. Kun Andreo Cseh ŝi fondis la unuiĝon Universala Ligo, mondfederistan organizaĵon surbaze de la verko de Clarence K. Streit. La oficiala lingvo estis Esperanto, sed povis aliĝi ankaŭ neesperantistoj. De tiam ŝi reprezentis Universalan Ligon en internaciaj mondfederistaj kongresoj kaj konferencoj, ĉiam akcentante, ke supernacia federacio bezonas neŭtralan supernacian lingvon. Per sia inteligenta kaj takta argumentado ŝi kreis en larĝaj medioj favoran sintenon rilate Esperanton.

Intertempe ŝi multe verkis kaj tradukis, antaŭ ĉio por la gazeto La Praktiko, en kiu ŝi kunlaboris ekde la fondo en 1932 kaj kiu fariĝis la oficiala organo de Universala Ligo. Ŝi ankaŭ tradukis en Esperanton, interalie la verkon de Rico Bulthuis La alia pasinteco kaj la verkon de Martin Kojc, „La lernolibro de la vivo“. Kuntradukantino de Akbar.

## **Verkoj**

Raporto pri la Konstituanta Kunveno de la Popoloj (1951)

Vertaalde Esperanto-examenopgaven (1931)

Wereldvrede en Esperanto (En: Jubileumboek 1926-1931)

Esperanto-examenopgaven (1922)

Esperanto-examenopgaven voor diploma A en B met vertalingen (1934)

Vertaalde Esperanto-examenopgaven (1923)

## Tradukoj

Bulthuis, Rico: La Alia Pasinteco (1952)

Chaudhuri, Bhabes Chandra: Nova Studo pri la Filozofioj de Rabindranath Tagore kaj Walt Whitman (1961)

Kojc, Martin: La lernolibro de la vivo

Limburg Brouwer, P. A. S. van: Akbar (Trad. J. C. kaj J. R. G. Isbrücker kaj J. Ziermans., 1923)

Privat, Edmond: Tragiek en Triomf van Zamenhof, auteur van de wereldhulptaal Esperanto (1947)

Ramaker, Theo: Sankta Nikolao en Nederlando

## Bibliografio

1971: Nekrologo de Marianne H. Vermaas en Esperanto, marto 1971 (784).

1935: N. i. [Andreo Cseh] Julia Isbrücker. En: Praktiko 1935/1 (37), p. 1 (kun foto). Repr. en Gacond, Claude (1983). Pri la Cseh-kursoj antaŭ 50 jaroj. En: KCE 151, aŭg.-nov.1983, p. 2-4.

## Biografio pri Julia C. Isbrücker

(Aŭtoraj rajtoj ne konataj)

Julia C. Isbrücker estis nederlandanino. Ŝi naskiĝis en Rotterdam la 22-an de septembro 1887, ĝuste kiam ekaperis publike la internacia lingvo Esperanto. Ŝi naskiĝis kiel Julia C. Dirksen, kaj mortis la 14-an de januaro 1971 kiel Julia Isbrucker.

Ŝiaj engaĝiĝoj estis gravaj – Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio (la plej granda organizaĵo de tutmonda esperanto-movado), membro de Internacia Centra Komitato kaj membro de la ekzamena komitato, prezidanto de la grupo en Hago kaj edzino de la vicprezidanto de UEA, Johannes Rijk Gerardus Isbrücker, kies familian nomon ŝi surpronis. Post la dua mondmilito la geedzoj skribis sian nomon sen tremaoj (do Isbrucker, kies prononco restis la sama).

Ŝi gvidis kursojn, faris prelegojn, ankaŭ pri pacifismo. Organizis la internacian Interreligian Konferencon en Hago en 1928, fondis kun Andreo Cseh (Ĉe) la internacian Cseh-Instituton en 1930 (poste nomita Internacia Esperanto-



Instituto.) Andreo Cseh estas tiu, kiu adoptis specialan instrumentodon por lernigi la lingvon: sen helpo de libroj, metodo kiu estas utiligata ankaŭ nuntempe, kaj kiun oni nomis devige Cseh-metodo.

Post la dua mondmilito, pro la okazinta detruo de Cseh-Instituto, denove kun Andreo Cseh ŝi fondis la unuiĝon Universala Ligo, mondfederistan organizaĵon surbaze de la verko de Clarence K. Streit. La oficiala lingvo estis Esperanto, sed povis aliĝi al ĝi ankaŭ neesperantistoj.

Ŝi multe verkis kaj tradukis: kune kun sia onta edzo ŝi tradukis, en 1923, Akbar; en 1952 ŝi tradukis „La alia Pasinteco” de Rico Bulthuis. Alia ŝia traduko estas de la verko de Martin Kojc, titolita „La lernolibro de la vivo”, kaj ŝi daŭre kaj intense kunlaboris, jam ek de la komenco (1932), ĉe la gazeto La Praktiko, kiu fariĝos la oficiala organo de Universala Ligo. Vi povas trovi kaj legi ĉi tiun gazeton rekte el la retejo de Esperanto-Muzeo en Vieno, ĉi tie inter la ciferecigitaj periodaĵoj:

<https://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/periodaĵoj/>

alklakante la nomon de la gazeto, periodo 1932-1947. Sube, mi reproduktas la koverton de la numero 1, 1932, kun enkonduko de Cseh.

<https://pionirojdeesperanto.wordpress.com/2018/05/05/biografio-pri-julia-c-isbrucker/>

## La filino de Julia Isbrücker Laŭ Vikipedio

Julia GUILLAUME-ISBRÜCKER (1916-1999) estis la filino de Julia Isbrücker (tiu estis la fondintino de Internacia E-Instituto en Hago, naskiĝis la 22-an de septembro 1887 en Rotterdam, mortis la 14-an de januaro 1971).

Julia GUILLAUME-ISBRÜCKER ĉiam aktive partoprenis en E-aranĝoj kaj estis ĝis 1996 estraranino de IEI. Ŝi mortis la 29-an de novembro en La Celle-Saint-Cloud (Francio).

Ŝi estis la vidvino de Jean Guillaume (tiu estis ĉefdelegito por Francio dum 30 jaroj kaj prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto 1974-1975).



*La nova esperantista geedza paro: Walter Stein, flugoficiro de la nederlanda armeo, kaj Elly Isbrücker, iama administrantino de La Praktiko, post la geedziĝa ceremonio.*

Elly Isbrücker (eble parenca al Julia Isbrücker) kaj Walter Stein.  
Kiu scias ion pri Elly?

Fonto: La Praktiko, Januaro 1940, paĝo 7

La Universala Ligo estis fondata en Hago la 14-an de aprilo 1942, je la 25-a datreveno de la morto de la granda pac-apostolo *D-ro L. L. Zamenhof*, aŭtoro de la lingvo Esperanto. En tiu malluma tempo, sub la korŝira impreso de la kruela tiraneco (en la antaŭa tago, la 13-an de aprilo 1942, la germanoj komencis la amasan ekzekutadon de la nederlandaj patriotoj), kelkaj homoj, fidelaj al la ofte persekutataj, sed eterne vivantaj kaj inspirantaj ideoj de la progresema homaro, en sekreto kunvenis kaj decidis festi la tagon en maniero plej inda al la memorata mortinto: doni per la Universala Ligo konkretan formon al lia idealo: la reunuigo de la homaro.

Por ĉi tiu alta celo la Universala Ligo laboros per la plej modernaj kaj praktikaj rimedoj. Ĝi funkciigos ampleksan sistemon de internacia amikiĝo, interrilatado kaj kunlaborado, kaj kreas ĉiuspecajn praktikajn servojn por helpi la internacian laboron. Inter tiuj la plej gravaj estas la internacia korespondado, studvojaĝoj kaj kunvenoj, libertempaj kolonioj kun kursoj, eldono de gazetoj kaj literaturo, kaj tutmonda ĝiro-sistemo.

Ĉar facila kaj fruktodona internacia kunlaborado nepre postulas la uzadon de komuna neŭtrala lingvo, kiu ne donas politikajn kaj ekonomiajn privilegiojn al unu aŭ kelkaj popoloj, la Universala Ligo uzas la neŭtralan mondlingvon Esperanto kiel oficialan lingvon.

La agado de la Ligo ne estas politika, sed kultura, eduka kaj praktike realiga.

Al partopreno en la Universala Ligo estas invitata ĉiu homo, kiu skribe deklaras aprobi la celon kaj principojn de la Ligo, kaj kontribuas al la konstrua laboro de la Ligo, alportante *laŭvolan nombron da simbolaj brikoj*. La aliĝo kaj la kontribuo okazas

unufoje por la tuta vivo. Pluaj brikoj estas laŭvole kiam ajn aldoneblaj. — La prezo de unu briko estas 1.— Stelo.

*Fundamentaj Membroj* estas tiuj, kiuj donacis minimume 500 brikojn.

*Aktivaj Membroj* estas tiuj Liganoj, kiuj krom la donaco de unu aŭ pluraj brikoj pagas ankaŭ jaran kotizon de 24.— Steloj. Ili ricevas senpage la periodajn eldonaĵojn (gazeto, almanako) de la Ligo, kaj rajtas ĝui diversajn favorojn disponigitajn al la Aktiva Membraro. La aktivan membrecon oni povas kiam ajn liberevole ĉesigi kaj rekomenci, sen perdi la ordinaran membrecon en la Ligo.

Oni povas fariĝi *Dumviva Aktiva Membro*, pagante kotizon de 500.— Steloj unufoje por la tuta vivo.

La membreco en la Ligo neniel devigas al ia laboro.

\*

LEGANTO! Ankaŭ al vi estas direktata la urĝa invito, aliĝi al la Universala Ligo. Vi estas bonvena kiel aktiva kunlaboranto, sed se viaj cirkonstancoj tion ne ebligas, ni firme kalkulas almenaŭ je via morala subteno per la skriba aprobo de niaj celoj, kaj je via materiala helpo per la donaco de unu aŭ pluraj brikoj, laŭ via financa povo kaj laŭ via simpatio al nia laboro.

Granda estas nia tasko, sed ni fidas, ke ĉiu inteligenta kaj bonvola homo estos kun ni. Tiel ni sukcesos plenumi valoran servon por la homaro, kies partoj ni ĉiuj estas kaj restos en ĝia malbona kaj bona sorto.

Kiel unuan taskon, por necesa bazo al vasta kaj efika laboro, ni fiksas la kolektadon de 100,000 membroj kaj 1,000,000 da brikoj. Ni esperas, ke ankaŭ vi kaj viaj brikoj estos en ĉi tiuj nombroj.

Hago, la 1-an de julio 1945.

#### LA PREPARA KOMITATO:

G. H. ANDERSON, Hago. — A. BLAAUWBROEK, Hago (sekretario). — D. de BOER, Hago. — J. D. BRAKEL, Rotterdam. — B. BROUWER, Hago. — A. CSEH, Hago (prezidanto). — J. H. W. DOORNEVELD, Dordrecht. — J. P. van DIJK, Rotterdam. — J. Th. de GOEIJ, Rotterdam. — H. A. de HOOG, Amsterdam. — J. N. HOOGENHOUT, Amsterdam. — J. C. ISBRUCKER-DIRKSEN, Hago. — Ds. J. H. LEDEBOER, Voorburg. — D. M. PONTI, Barendrecht. — Chr. F. W. SLIJPER, Utrecht. — R. van SPRONSEN, Hago. — A. H. van de VELDE, Hago (kasisto). — M. H. VERMAAS, Rotterdam. — E. F. VERSTRAEL, Hago. — J. H. VINK, Voorburg. — G. WIRIX, Voorschoten.

La 16-an de marto 1946, kiam la statut-projekto estis preta kaj en la Prepara Komitato jam pridiskutita kaj akceptita, kaj kiam estis jam aliĝintaj 1294 membroj kaj kolektitaj 17,787 brikoj,

okazis la unua ĝenerala kunveno de la Ligo. Ĝi akceptis la statut-projekton kaj elektis definitivan ligan estraron, kiu konsistas el la sekvantaj personoj:

#### La estraro de la Universala Ligo:

- Prezidanto:* ..... D-ro Edmond PRIVAT, profesoro ĉe la Universitato de Neuchâtel (Svislando), iama delegito en la Ligo de Nacioj.
- Vicprezidanto:* . S-ino J. C. ISBRUCKER—Dirksen, Hago.
- Sekretario:* ..... Andreo CSEH, Hago.
- Vicsekretario:* ... F-ino P. C. RADEMAKER, oficistino ĉe la Direkcio de la Nederlanda P.T.T., Hago.
- Kasisto:* ..... A. H. van de VELDE, Farmakologia Ĉefinspektoro de la Popolsaneco de Nederlando, Hago.
- Membroj:* ..... G. Alan CONNOR, ĝen. sekr. de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko, eldonanto de „Amerika Esperantisto”, Delegito de IEL en Novjorko, Usono.
- D. M. PONTI, internacia instruisto kaj propagandisto de Esperanto, Delegito de IEL en Barendrecht, Nederlando.
- C. POT, direktoro de la fabriko „Electro-Smit”, inventinto de la muziknotado „Klavarskribo”, Slikerveer, Nederlando.
- D-ro H. C. RAASVELDT, geologo, nuntempe en Bogotâ (Kolombio, Sud-Ameriko).
- F-ino M. H. VERMAAS, instruistino de Esperanto, Rotterdam, Nederlando.
- P. L. WRIGHT, Komitatano de la Londona Esperanto-Klubo, estinta prezidanto de la Brita Esperantista Asocio, Londono.
- Ludoviko ZAMENHOF, studento ĉe la Teknika Altlernejo en Varŝavo, Polujo.

El la gazeto La Praktiko, 1946/1-5

**INTERNACIA  
CSEH-INSTITUTO  
DE ESPERANTO**  
RIJOUWSTRAAT 172  
DEN HAAG  
(Nederlandoj)  
TELEFONO: 556677  
POSTĈEKKONTO  
162626

**REDAKTAS KAJ ELDONAS:**

Kvara jaro ★ **Januaro**  
Numero 1 (37) 1935

**Julia Isbrücker**

estas la nomo de la sinjorino, kiu en tiu bildo prezentas. La Esperantistaro de la tuta mondo bone konas ŝin, almenaŭ ŝian nomon kaj famon. Ĉar ŝi estas unu el tiuj pioniroj de Esperanto, kiuj per oraj literoj enskribis sian nomon en la historion de la mondlingvo.

Jus, en Decembro de la pasinta jaro, pasis la 25-a dat-reveno de la tago, en kiu s-ino Isbrücker aliĝis al la verdstela pac-armeo. Je tiu okazo la Esperantistaro de Hago kaj ĉirkaŭaĵo surprizis ŝin per varma jubilea ovacio. La 16-an de Decembro, en la kadroj de la Zamenhofa festo en Hago, multaj gesamideanoj el diversaj urboj en kortuŝa maniero superŝutis ŝin per la esprimoj de estimo kaj ŝato.

Estas tre kompreneble, ke la tutmonda Esperantistaro direktas viglan atenton kaj intereson al la honorinda persono de tiu eminenta samideanino, kies agado signifas aparian kaj ne malgravan

ĉapitron en la historio de nia movado.

Dum la kvarona jarcento de sia energia kaj admirinde sinofera agado s-ino Isbrücker akiris al nia movado sennombrajn kaj altvaloraĵajn sukcesojn. Per instruado kaj verkado per la gvidado de la societo „Fine Ĝi Venkos“ en Hago, per la organizado de la grandaŭtenta Inter-Religia Pac-Konferenco kaj per belaj paroladoj, radiantaj alparoloj da homoj al la paca kaj mondlingva movadoj. Kiel membro de la Ekzamena Komitato kaj de ICK kaj laste per la fondo de la Cseh-Instituto kaj per la starigo de la Esperanto-Domoj en Arnhem kaj Hago ŝi havigis novan brilon al la verda stelo.

Ni esperu, ke ŝi, kune kun sia edzo, ing. J. R. G. Isbrücker, Akademiano kaj vicprezidanto de UEA, ankoraŭ dum multaj jaroj donos al ni lumantan ekzemplon en laboro kaj ofero por la granda afero de la mondlingvo!



**La Praktiko**

**LA GAZETO, KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS**

Aperas monate. Abonprezo por unu jaro 2.50 ned. guldonoj, por duonjaro la duono. — La abona jaro komenciĝas en la monatoj Januaro kaj Julio. Unu numero kostas 0.25 ned. guld. Specimeno senpage. Reklam-tarifo: 1 paĝo 50.— guld., 1/2 p. 30.—, 1/4 p. 17.—, 1/8 p. 9.—, 1/16 p. 5.—, 1/32 p. 3.— guld. — Kopirajto de la enhavo rezervita.

La Praktiko, 1935/1

## Letero de Julia Isbrücker al s-ro Robert Kreuz

en libro de Ed Borsboom pri Andreo Ĉe

Represo kun telefona permeso de Ed Borsboom, 2020.

*Kara s-ro Kreuz,*

*Permesu al mi, ke mi denove klopodos doni al vi klaran komprenon pri la fondita Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, ĉar mi estas certa, ke regas pri nia celo miskompreno. Mi povus simple al vi respondi je via lasta letero, ke ni ne povas akcepti vian proponon, starigi apartan komisionon por organizi kursojn sub kontrolo kaj gvidado de ICK, dum ni povus aranĝi nur la detalojn. Sed mi opinias, ke estas fatale por nia movado, se la gvidantoj inter si agas kiel kontraŭuloj. Pro tio mi tute sincere kaj amike volas montri niajn ideojn.*

*Unue sciu, ke mi faras tiun leteron sen scio de s-ro Cseh, al kiu mi montros poste la kopion. Vi facile pensus, ke mi agas sub la influo de aliaj, sed mi insistas nepre, ke mi tie ĉi donas miajn proprajn pensojn. Nu s-ro Kreuz, sciu ankaŭ, ke ne impresas min*

*formalaj leteroj, nek stampilo pri Internacia Instituto de Esperanto, kiun vi uzadas post kiam ni anoncis al vi la starigon de nia instituto. Ni ne estas infanoj. S-ro Cseh laboras dum 20 jaroj plej internacie, mi laboras same 20 jarojn en Nederlando kaj iom internacie. Mi do atendas de vi lojalan traktadon, kiel al kunlaborantoj decas.*

*Kio vere impresas min, estas via grandega senlaca laboro por la movado, viaj oferoj kaj amo al nia afero, kaj tial mi respondas al vi kiel eble plej detale.*

*Jen nia vidpunkto: por aranĝi grandskale la instruadon de Esperanto ni devas entuziasmigi la homojn, kiel ĝis nun povis fari s-ro Cseh kaj tiuj sekvantoj, kiuj instruis laŭ lia metodo. La bazo devas esti amikeco kaj reciproka respekto. Mi vidis, ke post ĉiu Ĉe-kurso la homoj estis pretaj sin dediĉi al Esperanto, daŭrigi la studadon, ktp. Se ni anoncus pri komisiono por kursoj, se la*

gvidado ne okazus per homoj, kiuj amas kaj plene taksas la kursojn, tiam ĉio ŝtoniĝus. Vi ne havas tian entuziasmon por ĉi tiu subparto de la kursoj, alie vi ja de la komenco estus liginta s-ron Cseh al Ĝenevo. Tio ne estas riproĉo, sed lasu almenaŭ nin fari tiun parton. Vi povas facile kompreni, ke la laboro de s-ro Cseh estos grava helpo por la tuta movado, do ankaŭ por ICK. Kune ni povos multe fari, sed ne kun kolero kaj malfido reciproke.

La nomo, kiun ni donis al la entrepreno, similas al la jam ekzistanta, sed la intenco estas uzi la nomon Ĉe-Instituto, kio ne povas kaŭzi konfuzon, nur por leterpapero por la publiko ĝi estos Internacia Ĉe-Instituto de Esperanto. Cetere vi povus ankaŭ funkciigi vian instituton. Se ni donis la instigon al tio, ni nur povas ĝoji. Tion mi diras sen ironio, ĉar ju pli ni laboras des pli bone. Vi devas konfesi, ke via instituto ne funkciis plu.

Al aludo de profesoro Dietterle mi povas respondi, ke nia instituto estas vere internacia. Kun 12 landoj ni kontaktas. Kaj fine kelkaj demandoj. Kial ni ne rajtus preni la iniciativon de internacia instituto, dum ĉiuj aliaj esperantistoj simple faras same. Kiu povas malpermesi tion? Kial ni ne rajtus alvoki la esperantistaron, dum ĉiu esperantisto faras tion por plej sensignifaj aferoj? Mi esperas, ke vi volas pensi trankvile pri tio sen kolero kaj antaŭjuĝo.

Ni do nun fondis tute privatan entreprenon kiel multaj antaŭ ni faris kaj en kio estas nenio riproĉinda. La monon ni atendas unualoke de la nederlandanoj, sed ni esperas ke la tuta esperantistaro komprenos la utilon de la afero, apogante nin finance kaj morale. Por rapide kaj efike labori ni bezonas plenan liberecon, ne devigate antaŭe fari multan korespondadon por preni decidon. Jam 5000 svisaj frankoj venis de hagaj samideanoj sen ia peto miaflanke. Mi nun povas eklabori espereble en plena harmonio kun ICK kaj la aliaj esperantaj institucioj. Tio dependas nun ĉefe de vi. Volonte mi regule raportos pri la agado. S-ro Kreuz mi esperas, ke vi nun tute komprenas nian agmanieron, kaj en Oksfordo ni povos ankoraŭ paroli pri ĉio. Kredu min, ni kune povos fari miraklojn sed unuigite kaj harmonie. Mi parolis kun vi kiel homo al homo, ne konsiderante malgrandaĵojn, sed vidante nur nian komunan aferon.

Kun koraj salutoj, altestime, Julia Isbrucker.

## Pri Robert Kreuz en Vikipedio

Robert KREUZ [krojç] naskiĝis la 2-an de junio 1894 en Majenco kaj mortis la 31-an de januaro 1936 en Ĝenevo. Li estis oficisto kaj fakestro en la industrio, germana esperantisto, direktoro de UEA kaj membro de la Lingva Komitato.

Kreuz fariĝis esperantisto en septembro 1908. Post la unua mondmilito li revivigis la Sudokcidentan Esperanto-Ligon (SOL) en Germanio kaj kunlaboris en Rejnlanda-Vestfalia Esperanto-Ligo (Revelo). Li estis unue ĉefdelegito de UEA por sudokcidenta Germanio. Li sukcese kontraŭbatalis Idon kaj estis redaktisto de Esperanto triumfonta.



En 1925 li fariĝis ĝenerala sekretario de la Internacia Centra Komitato (ICK). En 1933 oni faris lin unu el du direktoroj de Universala Esperanto-Asocio (UEA), kaj en 1934 li fariĝis la sola pro la foriro de lia kolego Hans Jakob. Kreuz devis interalie estri la oficejon, organizi la Universalajn Kongresojn (fakte organizis nur tiun de 1935 en Italio) kaj redakti la revuon Esperanto.

Vojaĝoj kaj restadoj en diversaj landoj faris lin vasthorizonta homo, kiu parolis multajn lingvojn. Kreuz estis eminenta oratoro, unuagrada interpretisto plurlingva kaj tradukisto plej rapida, krome Esperanto-stenografo. Li iniciatis foiran reklamon per Esperanto por la internaciajn foirojn en Frankfurto ĉe Majno. Li kontribuis al ĉiuj grandaj Esperanto-gazetoj kaj estis ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio de Esperanto.

En la aĝo de nur 42 jaroj li mortis pro apopleksio.




Julia Isbrücker ĉirkaŭ 1930



Julia Isbrücker ĉirkaŭ 1938  
(Aŭtoraj rajtoj ne konataj)



# GRAFOLOGIA SLIPO



Poŝtkarto de Julia Isbrucker 1951

*Mi nun estas prezentonta al vi virinon, kiu naskiĝis ĝuste la saman jaron en kiu la internacia lingvo Esperanto prezentiĝis al mondo (1887); ŝi fariĝis esperantistino je la juna aĝo de 22 jaroj, la 1909-an. Mi prezentos ŝin absolute nur per la analizado de ŝia skribo.*

### **Grafologiaj signoj, kaj mezuroj (ĉefe koncerne la skribaĵon datitan 1951):**

Ligita interlitere 10 – *Larĝeco interlitere* 8, *Larĝeco de la literoj* 5, kaj *Larĝeco inter la vortoj* 4-5 (**vidu noton 2**) – tendence *sobra* 9, ankaŭ se la skribo estas pli mezgranda ol malgranda – baza linio plutenita 7 kaj, komplemente, *supreniranta* 3 (ankaŭ en la subskribo) – markitaj stangoj (t.e. kun fortaj premadoj) 7 – rigidaj stangoj 7 – kvazaŭ paralela (tendence) – rapida 6-7 – senpacienca 6 – konfuzita 6 (hiper-aktiveco povas kaŭzi konfuziĝon) – klara 6-7 (malklara 3-4, komplemente) – akurata spontanee (ne vere *pristudita*) pro la rapideco kaj la senpacienca – literoj A-O malfermitaj en la supra parto, 6 – Anguloj je tipo C 5 (reduktita taksado de ĉi tiu signo pro la ĉeesto de *konfuzita* kaj *senpacienca*) – literoj kliniĝintaj dekstren 5-6 – eleganta mezgrade, 5 – artefariteco komence de ĉefliteroj – ĉarma vanteco – kelkaj literoj apogitaj unu la alian (konfuziĝo kelkfoje iĝas maltrankvileco).

**Klariga noto pri la subskribo:** ĝi kutime montras la “socian Mion”, diverse la skribita teksto respondas al la “individua Mio”. La subskribo de **Julia C. Isbrücker** estas substrekita kaj progresive supreniras kompare al la baza linio; la fina trajto de la substreko estas pli multe markita kaj dika (agresem-indikilo)

---

## La personeco de Julia C. Isbrücker


### PSIKAJ KARAKTERIZOJ

*(laŭ la itala grafologia metodo de Girolamo Moretti)*

Jam per unua ekrigardo de ŝia skribmaniero, mi konstatas ke ŝi aspektas kiel tre aktiva persono, energie vigla (ĉefe se oni konsideras ke tiuj skribaĵoj estis skribitaj kiam ŝi estis 64- kaj 68-jara, respektive en 1951 kaj en 1954). Evidentiĝas ankaŭ ia senpacienca ekzaltiĝo (signoj kiuj elmontras tion: *rapida, literoj kunligitaj je la plej alta valoro* [10 dekonon!], kaj *senpacienca*); ne nur, sed ankaŭ evidentiĝas ia pensa kaj fara nebulecoj, devenantaj tre probable de

ŝia senpacienco, kiu originas el intensega agado kaj travivado (signoj: *konfuza 6, interplektaĵoj inter la linioj*) .

Sed ni daŭru laŭgrade kaj plej-profunden, por apudiĝi rekte al kelkaj analizeblaj psikologiaj trajtoj pri ŝia personeco.



Poŝtkarto de Julia Isbrücker 1954

### Inteligento:

Ŝia inteligento estas je tipo *fakta kaj asimila, lernema*. Ŝi estas persono kiu kapablas entuziasmiĝi, kiu facile lernas kion oni instruas aŭ proponas al ŝi; kaj ŝi emas alproprigi al si tiujn sciojn: arogante al si la meriton pri alies ideoj, kaj donante al tioj (?; rimarko) tute subjektivan ŝajnecon, ŝi povas atingi rezultojn vere tre brilajn... rilate al tio (?; rimarko), pri kiu ŝi emas okupiĝi.

Ŝi ne posedas ian specialan kreaŭ originalecon sed, serĉadante la aprobon de la aŭskultantoj, ŝi sukcesas konkeri ties konsenton. Ŝi havas la necesan batalemon kaj viklecon por atingi dominantan rolon. Ŝi emas imponi kaj tre ŝatas havi ĉirkaŭ si ulojn, kiuj akceptas de aliaj superregadon kaj kondiĉigojn.

Ŝi ne tro longe fiksiĝas sur detaloj, ŝi rimarkas personojn kaj situaciojn nur ĝeneral-vidpunkte, eĉ flankelasanten iun gravan kaj multsignifan atendon; aliflanke, la principoj kaj reguloj kiujn ŝi tre bone lernis kaj enmensigis fariĝas utila gvidilo por sia konduto, donante forton al ŝia agado, ĉefe kiam la premisoj ŝajnas al ŝi konfuzaj kaj perturbaj, malklaraj.

La atento-kapabloj de Julia estas moderaj, maloftaj la momentoj je trankvilo kaj atendo. Ŝia seninterrompa penso, karakterizita per strikta (rigora) logiko, flanken lasas la analizajn detalojn, kaj malfacile permesas al ŝi deflankiĝi de logikaj skemoj. Estas pro tio ke ŝiaj deduktoj kaj konkludoj povas limiĝi al simpla formalajaĵo, al tradicia kaj ordinara realo-aspekto, al ekstereco.

Mi povas aserti, ke ŝia nekapablo atendi la rezultojn kaj ŝia rapidecemeco (signo: *rapida*) provizas al ŝi – pozitive – tiun necesan kaj sufiĉan seninhibician puŝon por akcepti ankaŭ novaĵojn, t.e. sen obstine pensante pri la ‘jam dirite’ aŭ ‘jam farite’. Ŝia realo-percepto, do, ne estas tiom rigida, aŭ skizeca, kiom ekŝajnas ĉe la unua ekstera impresio.

### **Komunikokapablo:**

Ĉar ŝi taksas homojn plejparte laŭ ties respondoj kaj sia sento, ŝi ne ĉiam estas objektiva en siaj interrilatoj. Ŝi havas malfacilaĵon en kunfandado de siaj materiaj instinktoj kun tiuj spiritaj, pro tio ŝia konscio ofte vualiĝas, konfuziĝas, kelkfoje sugestiĝas. Same, ankaŭ la voĉa esprimo estas influata, ĉar la ideoj interkruciĝas, la sentoj kunpuŝiĝas kaj subite venas agitiĝo. Ŝiaj empatiaj kapabloj estas influataj de la rapidemeco, ŝi ne tenas grandan konsideron por alies necesoj, preferas kunlabori kun kiuj ne intermetas barojn, kun kiuj eventuale permesas al si esti kondiĉigataj aŭ dominataj. Ŝi celas, tiamaniere, al rekta atingo je siaj intencoj. Do, temas pri malfacila komunikpovo, ĉar Julia havas karakteron malmulte modeblan kaj ŝi ne bone akceptas sugestojn kaj konsilojn (ankaŭ pro la konfido al siaj kapabloj).

### **Sociemo:**

Laŭnature, ŝi ŝatas ĉion kiu koncernas socion. Ŝi estas allogata de kontakto kun la publiko. Socie ŝi estas tre multe motivata: al ŝi plaĉas ‘esti parto de’, ĉeesti, ‘aktiviĝi favore al’. Ŝi emas karieradi kaj plene sukcesi, dezirante profunde pliboniĝi, kaj tia lasta estas konsiderinda kvalito.

Julia sukcesas havi la estimon de la aliaj pro sia granda vervo kaj energia engaĝo favore al siaj pasiaĵoj – konvinke, entuziasme kaj ankaŭ sinofere – malgraŭ sia inklino imponi, kaj invadi alies kampon.

Dependinte de simpatioj kaj malsimpatioj, ŝi povas senkonscie apogi kelkajn homojn malfavorante aliajn, kaj tiel helpi favoratojn.

Memestimo aspektas en ŝi kiel fierego, ankaŭ pro la rezultoj kiujn ĉiukaze ŝi sukcesas akiri, ĉar estas vere iniciatema virino. Ŝi ŝajnas esti tre fiera pri si mem.

Iomete vantema, ankaŭ materie kaj fizike ne nur intelektu, Julia emas bone impresi, havas person-kulturon kaj haltas ĉe ŝajnoj, atentis (sed kun senpacienca kaj nervozeco) pri la sociaj konvencioj por ne rekte konflikti kun aliaj, ĉar ŝi interne serĉadas aprobon aŭ admiron.

En la profundo ekzistas en ŝi agresemaj puŝoj (*laŭ grafologistino Evi Crotti, longa streko bone evidentigita sub aŭtografo povus esprimi “venĝon originintan el pasintaj travivaĵoj” [noto 3]*). La longa substreko en ĉi tiu kunteksto montras la plenan batalemon kaj la engaĝiĝon, la ambicion kaj ŝian neceson de estimo aŭ de konsidero. Julia Isbrücker estas vere rezoluta virino (signoj: *markita en la stangoj, rigidaj stangoj, baza linio supreniranta kaj suprenirado ankaŭ ĉe la subskribo, kliniĝo dekstren de la literoj*). La baptonomon (kiu esprimas per si mem la intiman kaj privatan Mion) ŝi tiom strikte kunigas kun la familia nomo (kiu esprimas per si mem la socian, publikan, Mion), kaj tio pensigas: ŝi elektis la familian nomon de sia edzo kaj ne tiun de sia patro, kial? Ĉu pro estimo al edzo, aŭ ĉu pro rifuzo de sia pasinto? Sed pri tia elekto eblas influo de la nederlanda kulturo, aŭ leĝo [noto 4].

### Amrilatoj:

Julia precipe emas sin trovi frontlinie, emas ke siaj personaj sukcesoj estu agnoskataj kaj, kun tia ambicio, ŝi deziras samtempe, laŭdinde, ankaŭ pliboniĝi. Jes, ŝi vere posedas pioniran spiriton por neniigi barojn. Ŝia amemo estas influata de ĉi tiu firma est-maniero, kiu estas per si mem egocentra kaj individuista. Pro elstariĝo de tia ‘primadono’-rolo, ŝi povus malamikiĝi kun iu ulo aŭ ulino. Ne facile estas por ŝi rezigni siajn pretendojn, eĉ ne parte, eĉ ne en la privilegiita amo.

## Dispozicioj:

Pro la viditaj karakterizoj, sed ĉefe pro ŝia iomete mistifika kaj nur ŝajne cedema sinteno (celanta al akiro de universala admiro), kaj pro ŝia ekscesa kaj daŭra sin-valorigo, ŝi estas taŭga por profesia aktiveco kiel modelino aŭ por poluradaj kaj konturaj taskoj, ĉar ŝi atentis al estetiko.

---

## Notoj:

(1) *Estas kutime malfacile trovi informaron pri e-pioniroj. Multaj el ili estas forgesitaj, kvankam ili estis agemaj kaj antaŭenpuŝis Esperanton tra multaj malfacilaĵoj. Esperanta historio estas freŝdata, pli-vere dispecigita; historajn spurojn oni povas trovi pleje en la eventoj de unuopaj Landoj, pere de la multnombraj esperantaj gazetoj (pasintaj kaj aktualaj), ene de la okazintaĵoj de unuopaj esperantaj multfakaj asocioj (fervojistaj, katolikaj, akademias, sciencaj, kaj de la instruaj Institucioj pri la lingvo internacia...): nome, ne ekzistas fakta historiografia studado, kongrua kaj unueca, pri la monda esperanta movado. Sed, iom post iom, danke al interreto kaj vikipedio, oni ion povas trovi.*

(2) *Komparo inter la tri larĝecoj, por klarigo: Larĝeco **d e literoj** estas la grandeco de la intelekta kompreno-kapablo, Larĝa **i n t e r la literoj** indikas la mezuron de la juĝo (kiu povas esti pli malpli malfermita al mondo laŭ ĝia elano), kaj fine la Larĝeco **inter la vortoj** esprimas la mezuron de la kapablo argumentadi kaj kritiki, temas pri la tempo dediĉita al rezonado (kiu longigas aŭ mallongigas la blankan spacon inter vorto kaj sekva vorto). Respektive ili estas en la skriboj de Julia montritaj tiel: 5, 8, 4-5 = kio signifas: ekvilibra la kompreno-kapablo kun la kritikemo, sed malekvilibra la juĝo-objektiveco (**ekscesa larĝeco interlitera**).*

(3) *El la verko "Dimmi come firmi" [trad.: Diru al mi kiel vi subskribas] de Evi Crotti, Arnoldo Mondadori Eld., 2011, p. 46.*

(4) *Post mia eta enketo, mi ekscias, ke en Nederlando, kiel en Germanujo, post geedziĝo oni povas elekti teni sian familian nomon, alpreni tiun de la edzo, aŭ ambaŭ uzi. Eĉ viro povas alpreni aŭ aldoni la familian nomon de sia edzino.*

*Nuntempe okazas la samo por la ne-geedziĝintaj paroj, kondiĉe ke ili estu registritaj kiel oficiale kunvivantaj.*

Fonto: <https://lingvovojo.wordpress.com/2015/10/03/la-personeco-de-julia-c-isbrucker/>

(Aŭtoraj rajtoj ne konataj)

## DU FOTOJ



Meze Julia Isbrücker, dekstre Andreo Ĉe.  
Kiu konas la personon maldekstre?



Meze Julia Isbrücker, maldekstre Andreo Ĉe.  
Kiu konas la personon dekstre?

Dankon pro la disponigo de la du fotoj al  
Ward de Kock de Internacia Esperanto-Instituto





Julia Isbrücker kaj Klara Zamenhof 1923 en Nürnberg dum la  
15a Universala Kongreso. (Aŭtoraj rajtoj ne konataj)  
Klara Zamenhof, edzino de L. L. Zamenhof, naskiĝis kiel f-ino Silbernik la  
5-an de oktobro 1863 en Kowno,  
mortis la 6-an de decembro 1924 en Varsovio.  
Fonto: Vikipedio.



Stelo-moneroj 1959



Stelo-monero 1965



Stelo-monero 2018



Plasta mono de la Esperanto-Junularo 2012.  
Fotoj faritaj de Walter Klag.



Die Münze Österreich Aktiengesellschaft  
La Monerfarejo Aŭstria Akcia Kompanio

Wien - Vieno 3., Am Heumarkt 1

Hier wurden die neuen silbernen  
100- und 50-Stelaj-Münzen geprägt

En tiu-ĉi konstruaĵo pregiĝis la arĝentaj  
100- kaj 50-Stelaj moneroj

# Informoj kaj anoncoj



Floro de frago fotita de Irene Klag 2020

# DIE SILBERMÜNZE-MEDAILLE

## 100 STELOJ

### EIN SPITZENPRODUKT DER MÜNZE ÖSTERREICH



#### **Anlass: 150. Wiederkehr des Geburtstages von René de Saussure am 17. März 2018**

Er war ein Schweizer Sprachwissenschaftler und der Erfinder des universellen Geldes. Sein Bruder Ferdinand de Saussure war der Begründer der modernen Linguistik.

Limitierte Auflage: 1000 Stück, keine Nachprägungen. Durchmesser: 37 mm.

Oberfläche: Stempelglanz - PP. Lieferung in einer Kunststoffkapsel.

Masse: 1 Unze Feinsilber 999/1000 (31,1 Gramm). Zertifikat wird mitgeliefert.

Aus gesetzlichen Gründen ist die Silberpunze 925 aufgeprägt.

Herausgeber und Entwerfer: Mag. Walter Klag.

Künstlerische Feinarbeit: Mag. Helmut Andexlinger, Chefgraveur der Münze Österreich.

Hersteller: Münze Österreich, Wien 3., Am Heumarkt 1; [muenzeoesterreich.at](http://muenzeoesterreich.at)

Die Münze Österreich ist eine 100%ige Tochter der Österreichischen Nationalbank.

#### **Preis 60 € einschließlich der Versandkosten (gilt für Euro-Länder).**

Lieferung nach Vorauszahlung des Betrages. Bitte schreiben Sie die genaue Zustelladresse (gegebenenfalls auch die Wohnungsnummer) an [esperanto@chello.at](mailto:esperanto@chello.at).

Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, 1190 Wien, Aösterreich.

# La renaskiĝo de la Steloj

Antaŭ kvin jaroj kaj duono, dum FESTO 2012 en Métabief, Alexandre 'Aleĉjo' Raymond venis al mi kun freneza sed interesa ideo: eldoni Esperanto-monon. Tiutempe FESTO multe inovaciis, ĝi eldonis proprajn tasojn, ĉemizojn kaj pli. Dum la renkontiĝo grupo de homoj ĉirkaŭ tablo diskutis kiel aspektu la moneroj, kiom ili valoru kaj kiel ili funkcii. Post la somero Aleĉjo kontaktis kun presejo de plastaj moneroj por taksi, kiom realigebla estas la ideo. La plano fine aspektis jena:

- Estu moneroj de 1, 3 kaj 10 Steloj. Tio ebligas rapidan pagadon de diversaj eblaj monsumoj.
- La moneroj estu malsamkoloraj kaj malsamgrandaj, por ebligi facilan kaj rapidan uzon.
- La koloroj estu ruĝa, flava kaj verda, kaj la simboloj gufo, papago kaj krokodilo.
- La valoro de unu Stelo egalu al la plej malgranda kutima elspezo en trinkejo aŭ gufujo, do unu taso da teo aŭ unu glaso da kolao.



La finaj desegnoj estis senditaj kaj 3000 moneroj estis presitaj en oktobro 2012. Bonŝance en la fino de oktobro okazis malgranda renkontiĝo, kiun mi kunorganizis: Klaĉ-Kunveno Post-Somera en Nederlando. Ĝi estis perfekta por testi la novan monosistemon. La publiko ŝatis la monerojn, kaj sukcesis adaptiĝi al ĝia uzado. Post KKPS la Itala Esperanto-Junularo iĝis kuninvestanto de la projekto.

La originala valoro estis difinita kiel 4,2 Steloj en unu eŭro. Poste la valoro estas ligita al la inflacie kompensitaj valoroj de eŭro, realo kaj zloto kun pezaj de 76%, 20% kaj 4%. Do same kiel la antaŭa Stelo, tiu ĉi Stelo teorie tenos sian valoron. Ekde 2012 ĝis 2017 la valoro de unu eŭro en Steloj variis inter 4,040 kaj 4,581.

La Steloj estas ĉefe uzataj en trinkejo de junularaj Esperanto-renkontiĝoj. Ili estas valida pagilo en KKPS 2012-2017, IJF 2013-2017, JES 2012 kaj 2017, SES kaj FESTO 2013 kaj IJK 2015. Krome ili uziĝis en kelkaj trajnkaravanoj kaj eblas mendi ilin poŝte ĉe Aleĉjo aŭ Roĉjo.

La avantaĝoj de Steloj en trinkejo estas la facila uzo, la malalta pezo relative al metalaj moneroj, kaj la fiero havi specialan Esperanto-monon. La ĉefa malavantaĝo estas la bezono interŝanĝi alian monon kontraŭ Steloj en la komenco de la renkontiĝo.

La kvanto presita en 2012 devus sufiĉi por uzo en eĉ la plej grandaj junularaj renkontiĝoj. Se ilia uzo aŭ kolektado ekster la junulara movado ankaŭ kreskos, tiam dua presado estos pripensinda.

Rogier 'Roĉjo' Huurman

Bildoj: <https://commons.wikimedia.org/wiki/Category:Stelo>  
Bonvolu mendi la plastajn Stelojn ĉe [rogier.huurman@gmail.com](mailto:rogier.huurman@gmail.com)

# Julia Isbrücker-Jaro 2020

## Invito al kunlaboro

2020 estas la 100a datreveno de la 12a Universala Kongreso en Hago (1920). Julia Isbrücker kunorganizis ĝin. La realigo de tiu kongreso pravas, ke ankaŭ granda milito ne povas neniigi Esperanton. Julia kunfondis Internacian Esperanto-Instituton kaj Universalan Ligon kaj kuneldonis la metalajn Stelo-monerojn, kies nominaloj estas 1, 5, 10 kaj 25 Steloj.



Sur la monero Julia Isbrücker, desegnita de mag. Helmut Andexlinger, la ĉefdezajnisto de Münze Österreich.

2020 aperis arĝenta 50-Stela monero por la honoro de Julia Isbrücker: Maso 30 gramoj da arĝento 925/1000, diametro 40 mm, eldonkvanto 300. **Prezo 60 € plus sendokostoj (validas por la eŭro-landoj).**



Bonvolu sendi al mi tekstojn kaj fotojn de kaj pri Julia. La kolektita materialo aperos kaj en la formo de vikipediaj artikoloj en diversaj lingvoj kaj kiel broŝuro. En la fina eldonaĵo via nomo estos menciita.

Walter Klag, [esperanto@chello.at](mailto:esperanto@chello.at)





# *La Bulteneto*

DULINGVA MAGAZINO ELDONATA EN VIENO  
ZWEISPRACHIGES MAGAZIN AUS WIEN

La cifereca versio estas senpaga.  
Mendu vian PDF-ekzempleron ĉe  
[esperanto@chello.at](mailto:esperanto@chello.at)

La paperan version ricevas donace  
Aŭstria Nacia Biblioteko, Vieno, Aŭstrio;  
aliaj bibliotekoj post peto.

Eldonistoj: Renate kaj Walter Klag.

Redaktejo - eldonejo - presejo:  
Rudolfnergasse 8/11, 1190 Vieno, Aŭstrio.



Walter Klag  
Alfred Heiligenbrunner  
Irene Klag  
Lengyel Pál  
Mária Minichová kaj Marteno Minich  
Holli67

# SAT.IROJ



MOK!  
MOK!

Oka kajero



Mendu la sat.iroj-kajerojn  
ĉe  
esperanto@chello.at

PDF senpaga.



# Esperanto-Bibliothek und Ausstellungsräume

Wien 1., Herrengasse 9  
Haltestelle Herrengasse der U3  
Telefon 0043 1 534 10 730 - [esperanto@onb.ac.at](mailto:esperanto@onb.ac.at)

Öffnungszeiten  
Dienstag bis Sonntag 10 bis 18 h  
Donnerstag 10 bis 21 h



Im selben Haus befinden sich auch  
die  
**Sammlung für Plansprachen,**  
die  
**Musikaliensammlung**  
und das  
**Globenmuseum**